

Kataluna esperantisto



NUMERO 341 (107)
KVINA EPOKO
JANUARO-MARTO 2007

*Manifestacio
por la okcitana*

KEJ-asembleo

Por asocia identeco

IRO 2007

Vakigo en Premià de Mar

Utilo malgranda

Unu lingvo, du sistemoj

*L'Afer Tornasol
en francoprovençal*

*Traductors automàtics
a l'esperanto*

La gramàtica apropa illes

Salvant l'inuktitut

Pàgines 14 i 15

Cacera de bruixes a Ràdio Polònia

El 2 de novembre passat, Barbara Pietrzak, redactora en cap del programa en esperanto de Ràdio Polònia, va informar els seus oïdors que la nova direcció de l'emissora havia decidit el tancament de les emissions en aquest idioma. La inesperada notícia va ser rebuda amb gran consternació pels milers d'oïdors esperantistes d'aquest programa en tots els continents. Amb gran rapidesa es va difondre a través dels diferents fòrums esperantistes que hi ha a Internet. La reacció es va concretar en l'enviament massiu de protestes a les ambai-xades de Polònia en nombrosos països, al Ministeri d'Afers Estrangers de Polònia i a la direcció de l'emissora. Fins i tot el president de l'Associació Universal d'Esperanto, Renato Corsetti, va enviar una carta al president de la República de Polònia, Lech Kaczyński.

L'ultradretà Lech Kaczyński, president de la República, i el seu germà bessó Jarosław, primer ministre de Polònia.





Ocitania kaj esperanta flagoj
flirtas en Besiers

ROGER SANJAUME

Ni ne nur semu kaj semu konstante

Ne antaŭvideblaj ĵurnalistoj

La reagoj de la gazetaro ŝajnas neantaŭvideblaj. La komenco de projekto pri aŭtomata tradukado al esperanto fate de la universitato Pompeu Fabra ŝajnis kurioza novaĵo interesonta la amaskomunikilojn. Tiucele, KEA kaj la universitato komune redaktis cirkuleron kaj dissendis ĝin, tamen la reago estas ĝis nun nula. Tute male okazis, kiam antaŭ tri jaroj KEA lanĉis la kampanjon pri la centjariĝo de la organizita esperanto-movado en Katalunio. Jen iom stranga kaj konvencia datreveno, sed ĝi vekis konsiderindan intereson inter la ĵurnalistoj: de post la jubilea jaro 1987 ne estis tiel multe da artikoloj pri esperanto en nia lando kiel en 2004. Bedaŭrinde, kiam nun eblas ligi esperanton ne al pasinto, sed al plej moderna esplorando, la amaskomunikiloj neglektaj la novaĵon.

Aliflanke, tute pozitiva montriĝis la agado de KEA en la manifestacio por la okcitana de Besiers. Nia bonega skipo de komputisto kaj dizajnisto sukcesis kre allogan retpaĝon, en kiu oni informis pri la manifestacio kaj pri la kialoj de la esperantistoj partopreni ĝin. Sur-

baze de la sperto en la okcitanisma amasiĝo en Carcassona de antaŭ jaro kaj duono, ni sciis, ke rapida alĝuto de fotoj estos atuto, kiu vekos intereson de *Vilaweb*, la ĉefa katalunlingva retgazeto. Kaj tiel okazis: la unua novaĵo de *Vilaweb* pri la manifestacio ligis al nia retpaĝo, sed ne mencias la asocion; en posta modifo, posttagmeze, la nomo de KEA jam videble aperis en kadro; kaj en la vespera, definitiva versio de la novaĵo, post la alĝuto de la fotoj tuj post la manifestacio, la nomo KEA aperis ankaŭ en la teksto mem de la novaĵo. Esperantista agado estas pozitive rigardata fare de amaskomunikiloj.

En la okazo de la aŭtomata tradukilo, eblas plendi pri la gazetaro kaj vei, ke ĝi neglektaj esperanton, tamen tio kondukos nin al neniu eblo helponta nian informadon. Male, la agado pri la manifestacio en Besiers montras sukcesan lernardon el antaŭa sperto, kiu igis la informan agadon de la asocio plene trafo. Ni ne nur semu kaj semu konstante, sed ĉefe lernu el la sperto.

Hektor Alos i Font

En ĉi tiu numero kunlaboris: Alla Kudrjašova, Carles Verdugo, Chiara Fortunato, Darío Rodríguez, Esperanto Conflent, Ferriol Macip, Gerard Escuer, Guillem Sevilla, Joan Català, Jordi Aromí, Josep Enric Peres i Blesa, Karles Berga, Llibert Puig, Marie-Thérèse Lloancy, Marta Ibáñez, Miquel Gómez i Besòs, Mon Cardona, Nicole Margot, Ramon Perera, Robert Navarro, Roger Sanjaume, Rut Rovira.

Registrata ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie Agnoskitaj)

Peranto de: UEA (revuo Esperanto, Kontaktoko kaj libroj), FEL (revuo Monato kaj libroj), IKEL (revuo Etnismo), La Kancerklíniko, La Ondo de Esperanto, Scienca Revuo, Komencanto, Juna Amiko, Internacia Pedagogia Revuo, La Gazeto, Fonto, Literatura Foiro, Heroldo. Ni peras ankaŭ aliajn revuojn.

Apartat/Poštkesto 1008
08200 Sabadell (Vallès Occidental), Catalunya/Katalunio
Tel. 937 109 636; Fakso: 937 163 633

Ret-adreso: kea@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat
Ret-listo: Aliĝoj ĉe listastro@esperanto.cat

Kotizoj por la jaro 2007: individua abonanta membro, 40 eŭroj; individua subtenanta membro, 80 eŭroj; individua dumviva membro, 800 eŭroj; kolektiva membro, 80 eŭroj; juna membro, 25 eŭroj.

Banko: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona agència 461 Sabadell, kontonumero: 2100 0461 90 0200055053
IBAN: ES95 2100 0461 9002 0005 5053

Konto UEA: kaea-b
CIF: G-58338567

Plenumkomitato de KEA: Prezidanto: Josep Franquesa; sekretario: Hektor Alos i Font; kasisto: Llibert Puig; komitatoj: Gemma Armadans, Gerard Escuer, Ramon Perera.

Kontrola Komisiono: Christian Pinard, Luz Vázquez, Óscar Puig.

Kataluna Esperantisto: Hektor Alos i Font; katalunlingva revizianto: Josep Enric Peres i Blesa; kompostanto: Ferriol Macip i Bonet.

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

Kataluna Esperanto-Junularo:

Registrata ĉe "Generalitat de Catalunya" en la tria sekcio per n-ro 102-AJUV. Landa sekcio de TEJO. CIF: G-58964461

Ret-adreso: kej@esperanto.cat
Ret-paĝo: www.esperanto.cat/kej
Ret-listo: Aliĝoj ĉe www.moviments.net/cgi-bin/mailman/listinfo/kej

Estraro: Prezidanto: Jordi Aromí; sekretario: Carles Verdugo; kasisto: Xavi Batlle; informado: Guillem Sevilla kaj Pau Climent; esperantaj rilatoj: Joan Català; ne-esperantaj rilatoj: Roger Sanjaume.

Imprès a/Presita ĉe: Copimatge, Sant Cugat del Vallès (Vallès Occidental), tel. 935 892 368. Dipòsit Legal: B-27362 - 1982

Katalunaj esperantistoj manifestacias por la okcitana

Katalunaj esperantistoj partoprenis en la manifestacio por la okcitana lingvo en Besiers la 17an de marto organiza de la Instituto pri Okcitanaj Studioj kaj aliaj kvin okcitanaj kulturaj asocioj. La manifestacio kunigis 20 000 homojn por postuli la rajtojn de la okcitanoj uzi sian lingvon. La iniciato estas daŭrigo de la unua tut-landa amasiĝo por la okcitana lingvo, okazinta en Carcassona la 22an de oktobro 2005, kiam pli ol 12 000 homoj surstrate pledis por la okcitana, por ĝia oficiala agnosko kaj por kontraŭstari la malhelpojn, por ke ĝi estu instruata en la lernejoj kaj uzata en la amaskomunikiloj.

KEA havas fortan ligon kun lingvoprotektaj agadoj kaj aparte por la okcitana. Eĉ David Grosclaude, la nuna prezidanto de la Instituto pri Okcitanaj Studioj –tiam elstara kulturaganto–, prelegis en prilingva aranĝo por neesperantista publika organizo de KEA antaŭ deko da jaroj. En 2005 nur du esperanto-asocioj subtenis la manifestacion en Carcassona: KEA kaj la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL). Ĉi-foje aliĝis unu okcitania esperanto-grupo (la loka: Cercle Biterrois d'Esperanto), tri katalunlandaraj (KEA, KEJ kaj Valencia Esperanto-Junularo –VEJ), kvar francaj (Espéranto Culture et Progrès, Espéranto et Diversité des Langues, Centre Culturel Espéranto el Tours kaj Espéranto Jeunes) kaj unu internacia (IKEL). Okcitanaj kaj katalunaj esperantistoj organizis budon apud la maršejo kaj KEA eldonis kaj distribuis okcitanlingvajn flugfoliojn. KEA, KEJ, VEJ kaj IKEL, kune kun la neesperantista organizo ADÒC (Asocio por la Diskonigo de Okcitanio en Katalunio), kreis specialan retpaĝaron por la aranĝo en tri lingvoj (okcitana, kataluna kaj esperanto) kaj marĝis malantaŭ tri metrojn larĝa tolafiso en la okcitana. Francaj esperantistoj marĝis malantaŭ franelingva tolafiso. Verŝajne mankis aliaj esperanto-asocioj, ne nur internaciaj, sed ankaŭ naciaj: la subteno de malplimultaj lingvoj aperis ne kun la Manifesto de Prago, sed havas multe pli longan tradicion en la esperanto-movado ol ofte kredas esperantistoj, ĉar jam en 1906 “hungarlanda” esperanto-asocio aliĝis al la mejloŝtona unua internacia kongreso pri la kataluna lingvo, sur kies konkludoj oni statrigis la nunan norman katalunan lingvon.



KEA, KEJ, VEJ kaj IKEL, kune kun la neesperantista organizo ADÒC (Asocio por la Diskonigo de Okcitanio en Katalunio), marĝis malantaŭ tri metrojn larĝa tolafiso en la okcitana

Ĝuste, la aktivado de KEA daŭrigas sian strategion agadi ekster la esperanta kadro kaj ligiĝi al agadoj por subteni la lingvan diversecon, pro kio ekz. ni subtenis, kune kun IKEL, la pasintjaran kongreson pri la aragona lingvo. La organizo de la TTT-ejo kaj ĝia diskonigo tra la gazetaro celis plibonigi la rezulton atingitan en 2005, kiam, post la manifestacio de Carcassona, la TTT-ejo de KEA staris inter la unuaj afišintaj fotojn de la okazaĵo, kaj pro tio estis anoncita en nacilingvaj retgazetoj kaj sukcesis senteble plimultigi la nombron de vizitantoj dum kelkaj tagoj. La rezuldoj superis la esperojn: Vilaweb, la ĉefa kataluna retgazeto, en sia informo pri la manifestacio, atentigis pri la esperanta TTT-ejo, ĉar ĝi fariĝis la sola informejo en la kataluna pri la manifestacio. La esperantistoj estis eĉ kontaktitaj plurfoje laŭlonge de la tago por informi la retgazeton pri la evoluo de la afero. Rezulte, la TTT-ejo de KEA atingis sian maksimumon de vizitoj dum du sinsekvas tagoj, malgraŭ la multaj konkurencaj politikaj okazaĵoj de la tago (i.a. grandaj diverscelaj manifestacioj en Barcelono, Palmo de Majorko kaj Euskio). Entute, do, agado por esperanto, por la okcitana kaj por la lingva diverseco. □



Okcitanaj kaj katalunaj esperantistoj kunhavis budon sukcese aranĝitan kaj prizorgitan de la lokaj esperantistoj

Trankvila asembleo

Dek naŭ membroj partoprenis la jaran asembleon de KEA. Plej elstaris ampleksa informo pri la agado de la asocio kaj informoj fare de KEJ-proparlantoj pri la jus okazintaj ŝangoj en la junulara organizo deciditaj en la laborkunveno de Mataró. La KEA-sekretario, Hèctor Alòs, anoncis sian eksigón en la venont-jara asembleo, sed en la nuna jaro ŝangigis nur unu estrarano: Gerard Escuer anstataŭis Mateu Vic, kiu finis trijaran mandaton.

Budo en Castelló

Sabaton la 10an de marto dum la festo de Magdalena 2007 (loka festo en Castelló de la Plana) vespero kuniĝis en Casal Popular de Castelló diversaj budoj el alternativaj muzik-distribuantoj kaj sendependaj librejoj kaj okazis ankaŭ muzik-konerto de kvin akustikaj gitaristoj. Valencia Esperanto-Junularo aranĝis budon kaj tiel kontribuis al la diskonigo de la internacia lingvo kaj la aktivajoj de VEJ-KEJ-KEA inter la foiranoj. Ni havis budon kun muzikaj KDoj, libroj, diversaj vortaroj kaj aliaj materialoj. Indas anonsi, ke multaj homoj interesiĝis pri la ideo de esperanto, pri la bezono de nia batalado en la hodiaŭa mondo kaj demandis, kie ili povas lerni esperanton. Post la foiro, ni kontentas pri ties rezulatoj. Esperanto bezonas, ke ni plu agu!

Por la venontaj budoj, VEJ bezonos propran panelon aŭ grandan flagon por facile kapti la atenton de la publiko kaj proprajn materialojn de VEJ.

jc

KIS-TV, subvenciita

Institucio Hodler 68 asignis 1500-eŭran subvencion al KIS-TV por aĉeti kameron. Ĉi tiu UEA-fondajo, laŭ la nomo de la fondinto kaj unua granda mecenato de UEA, akumulas kapitalon, kies renton ĝi uzas por apogi UEA kaj aliajn movadajn instancojn kaj projektojn. KIS-TV tute taŭgas kiel projekto subtenata de la Institucio, ĉar ĝi same helpas la disvastigon de esperanto en videbla, profesia formato, same kiel ĝi kreas novan proponon, per kiu esperanto estas efektive uzata kiel pera lingvo en transkulturaj informoj.

KEA manifestas

KEA aliĝis en januaro al apoga manifesto por la okcitana, okaze de la granda porlingva manifestacio en Besiers. Sammonate ĝi aliĝis al manifesto por la atingo de paco en Euskio per dialogo sub la devizo "Neniu perforto, jes al paco".

Esperanto en la amaskomunikiloj

Esperanto aperis sufice kontentige, ĉefe en diversaj lokaj amaskomunikiloj. En *Presència*, la 12an de januaro, aperis recenzo pri reeldono de la libro *En el repòs de la trinxera* de Frederic Pujulà i Vallès, kun atentigo pri la esperantisteco de la aŭtoro. Simila informo okazis pri la forpaso de Renat Llech-Walter, raportita en *L'Indépendant* kaj *Vilaweb Perpinyà*. Ankaŭ la esperantistecon de la intervjuto oni reliefigis okaze de tutpaĝa babilado kun Julián las Heras, publikitata en *El 9 Nou* la 2an de februaro. Esperanto estis menciiata ankaŭ okaze de artikolo en la suplemento *Metrópolis* de la ĵurnalo *El Mundo* de la 16a de februaro pri la uzado de malpli oftaj lingvoj en kinarto, kaj en artikolo pri la Komisarejo pri Propagando de la kataluna registaro dum la enlanda milito, aperinta en *La*

Vanguardia la 20an de februaro (unu el la lastaj de Josep Maria Huertas Claveria). Ankaŭ la esperant-lingva afišo de tiu komisarejo estis reproduktita en *Presència* la 23an de februaro. Ferriol Macip estis intervjuita en Ràdio Sant Feliu de Llobregat la 22an de februaro kaj Joan Inglada en la radistacio Canal Blau Vilanova kvin tagojn poste. Ankaŭ la agado de la katalunaj esperantistoj pri la manifestacio en Besiers estis raportita la 16an de marto en kvar diversaj lokaj eldonoj de *Indymedia* (Barcelono, Marsejlo, Tuluzo kaj Nico), en la retgazeto *Vilaweb* en la sekva tago kaj en *Vilaweb Perpinyà* en la postsekvanta. Krome, la senpaga semajna gazeto *Tot Mataró*, vaste disvastigita en la urbo, publikigis tre vigilan kaj favoran artikolon tripaĝan pri esperanto, okaze de la semajnfina laborkunveno okazinta en tiu urbo. Tamen plej elstara pro sia taŭgeco kaj disvastiĝo estis la tre videbla intervjuo al Ramon Perera aperinta la 19an de februaro en la senpaga ĵurnalero *20 minutos*.

Reta vendeo ĉiesa

Joan Català prilaboris, kun la helpo de aliaj esperantistoj, provversion de reta librovendejo por KEA. Tiucele li verkis novan ret-vendejon (e-vendejo.mine.nu), ĉar la ĝisnunaj ne kontentigis lin. La nova projekto "retvendejo" estas malgranda, elasta kaj plurlingva: ĝi permesas facilan mastrumadon kaj havas allogan dizajnon. Cetere, ĝi estas verkitaj kiel libera programaro kaj sekve estas uzebla de ĉiuj dezirantoj –ne nur de KEA. La reta libroservo de nia asocio estos espereble funkcianta per ĝi antaŭ la fino de la jaro.

KEJ-agado en Tejo Tutmonde

La januara numero de *Tejo Tutmonde*, la movada gazeto de TEJO, elstarigas du agadojn de KEJ kaj KEA: Mondan Kalendaron, la malfermitan retpaĝan kalendaron lanĉitan pasintare de KEJ, kaj la esperanto-tradukojn de Indymedia Barcelono, okaze de ilia du-jariĝo. Krome, la revuo enhavas ankaŭ intervjoun al la iniciatinto de la du projektoj, Joan Català, pro ties komitatanecon en TEJO.



Indymedia
Barcelona

**Sendependa
inform-centro
ankaŭ en esperanto**

<http://barcelona.indymedia.org>

Oficiala komuniko de Kataluna Esperanto-Junularo

La 17an kaj 18an de februaro okazis la lasta asembleo de KEJ, kun la partopreno de membroj kaj aliaj movadanoj. La partoprenintoj pasigis tutan semajnfinon en la urbo Mataró. La sesioj disvolviĝis en la sidejo de la loka Sindikato de la Konfederacio CNT/AIT, kun kiu ni daŭre kunlaboras en tiu regiono. Kelkaj ĵurnalistoj interesigis pri la kunsido kaj profitis la ŝancon por publikigi tri-paĝan artikolon pri esperanto ĝenerale kaj pri la movado en Mataró. La artikolo aperis en loka revuo akompanite de foto de la kunsido.

Ĉi-jare, du-tri monatojn antaŭ la dato de la Asembleo, TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) demandis al KEJ, ĉu ni eventuale povus surpreni la respondecon organizi estontan IJK (Internacian Junularan Kongreson) en Katalunio. Tiu demando vekis reagon de la membraro, kiu komencis diskuti kaj debati kadre de la disendo-listo de KEJ en la reto. Dum tiu retdebato la KEJ-anoj kaj aliaj movadanoj komencis demandi sin pri la veraj kapabloj de nia asocio. Ĉar la interreta debato evidentigas nesufiĉa, kaj danke al nova engaĝiĝemo de la nuntempaj aktivuloj, oni decidis renkontiĝi por havi ĉe-estan Asembleon.

Dum la kunveno okazis cerbo-ŝtromo same kiel pasintjare en Benicàssim, el kiu ni tiris kelkajn gravajn konkludojn. En tiu ĉi cerbo-ŝtromo estis pritraktitaj du ĉefaj temoj: la renkontiĝoj de KEJ kaj la organiza strukturo de la esperanto-junularo en Katalunio. Finfine ni



Jordi Aromí dum diskutado pri estraraj funkcioj

ĉiuj decidis, ke ni ankoraŭ ne estas pretaj organizi IJK, sed ni planas organizi SPR (Sen-Programan Renkontiĝon). Tio estas Internacia tendaro proksime de Alakanto de la 16a ĝis 22a de julio. La dua ĉefa decido koncernis la organizan struktururon, kaj pri tio ni decidis, ke ni bezonas pli bone organiziĝi. Tial ni elektis novan estraron, kiu ekpaſis tuj post la kunsido.

Ŝajnas, ke nuntempe regas nova estoso interne de la asocio. Homoj, kiuj surprenis respondecon, komencis vigle labori organizante la venontan Printempan Renkontiĝon. Ĝi estos la kvara nacia renkontiĝo de KEJ kaj okazos apud la vilaĝo Vallgorguina de la 4a ĝis la 6a de majo. La lokon de la ĉi-jara KEJ-renkontiĝo ni fiksos pro ĝia proksimeco al Cardedeu, kie grupo de junaj membroj

de la loka ĉelo de la Studenta Sindikato de la Kataluna Landaro lernas esperanton de antaŭ kelkaj monatoj en kurso kunorganizita de KEA.

Nun ni staras antaŭ nova periodo de la junulara movado en Katalunio. Tamen ni ne povas plenfidi je la aktiveco de kelkaj membroj. Tial, ĉar ni konscas, ke la abunda partopreno de multnombra membraro estas la ununura garantio de nia sukceso, ni invitas vin aktive kunlabori en la asocio membrigante kaj partoprenante en ĉiuj niaj venontaj aranĝoj. Ni esperas renkonti vin baldaŭ dum la primtempa renkontiĝo en Vallgorguina kaj ankaŭ somere en la internacia tendaro SPR en Callosa d'en Sarrià.

Carles Verdugo (KEJ-sekretario)
Jordi Aromí (KEJ-prezidanto)

4a PRINTEMPORENKONTIĜO
IV JORNADES D'ESPERANTO

Can Clarens, Vallgorguina (Vallès Oriental)
4an, 5an kaj 6an de majo 2007 - 4, 5 i 6 de maig 2007

Ni atendas vin! Pli da informoj ĉe: www.esperanto.cat/printempo2007

Disvolvo de la asocia identeco de KEA

Kelkajn monatojn antaŭe, oni proponis renovigi la tutan KEA-interretejon. Ĉar la retejo estas nia unua bildo por tiuj, kiuj vole aŭ hazarde trovas nin en la tut-tera teksaĵo, gravas, ke ĝi estu bone pensita por agi kiel efika varbilo kaj informejo. Tamen, eklaborinte pri la nova retejo, ni konstatis la mankon de unueca kaj firma asocia identeco, ĉefe grafika sed ankaŭ ideologia, kiu gvidis nin al plej efika disvolvado de tiu tasko. Pro tio, la reteja kreado postrestis kaj sentiĝis bezono komenci procezon celantan la disvolvigon de tiu ĝis nun mankanta asocia identeco. Tiu identeco, pri kiu ni parolas, celas:

– **Plej bone videbligi la asocion kaj ĉiujn ĝiajn agadojn.** Tion ni planas fari per la dizajno de unueca kaj kohera kommunikad-sistemo (fiksigo de identecaj simboloj, de grafik-strukturoj, de ĉefaj ideologiaj atributoj ktp), kiu transdonu taŭgajn bildon kaj informojn pri nia asocio al la ekstera publiko kaj pli klarajn informojn pri la asocia vivo al la membroj.

– **Certigi, ke ĉiu asocia mesaĝo (ĉu grafika, ĉu teksta ktp) komunikas klarajn ideojn koherajn kun la asociaj celoj.**

– **Plej ŝpare utiligi niajn rimedojn (homajn kaj monajn).** Interalie, la sistemi-

go de tiu asocia identeco igos nenecesa la rean diskutadon pri identec-elementoj ĉiam, kiam nova komunika elemento necesiĝas (kion ni celas komuniki?, al kiu?, kiel? ktp).

Por atingi tiun celon, oni kreis plurpašan agadplanon, kiu estis prezentita al la KEA-estraro kaj ricevis de ĝi favoran opinion. Tiu agadplano dividiĝas en diversaj ŝtupoj, kiujn ni ĉi-sekve skizas:

1a fazo:

1) Esplorado. Ĝi celas koni la nunan staton de la asocio (ĉefe el la komunika vidpunkto) kaj ĉion faritan ĝis nun.

2) Identigo. Ĝi celas ellabori la plej taŭgan enhavon per la difino de la ĉefaj komunikindaj konceptoj.

3) Sistemigo. Ĝi celas pripensi kaj elnomi, kiuj estas la plej taŭgaj rimedoj por komunikado.

4) Diagnozo. Ĝi celas sciigi la gradon de malsimilo inter la “optimuma” kaj la nuna stato.

5) Bilda kaj komunika politiko. Ĝi celas difinon de la “filozofio”, per kiu la asocio komunikos sian identecon, parte difinitan en la dua ŝtupo (t.e. ĝeneralaj komunik-stilo, frap-frazoj, ĉefaj komu-

nik-rimedoj ktp). Ĝi celas difini ankaŭ la organiza strukturon, kiu realigos la asocian identecon (kiu faros kion ktp)

2a fazo:

6) Bilda kaj komunika interveno. Surbaze de la antaŭa laboro estos planita ŝtupo (el grafika vidpunkto) kaj dividita en partajn programojn (ekz-e: dizajno de grafikaj identigiloj, aplikado en diversaj rimedoj, dizajno de grafikaj strukturoj por seriaj pecoj, ttt-ejo, ktp).

7) Partaj programoj. La plej longa ŝtupo. Ellaboriĝos kaj efektiviĝos la antaŭe planitaj partaj programoj.

Por taŭge kompletigi la duan paĝon (identigo), oni kreis laborgrupon kunordigitan de Joan Inglada, kies celo estas difini tiujn atributojn, kiuj reprezentas KEA kaj diferencigas ĝin de similcelaj organizacioj.

Se vi deziras partopreni tiun laborgrupon vi membris en la retrgrupo groups.yahoo.com/group/grup_treball

*Guillem Sevilla (dizajnisto kaj membro de la Komisiono pri Informado de KEJ)
Rut Rovira (dizajnisto)*

La plej freŝa e-vento ĉi-somere!



**senprograma renkontiĝo
Callosa d'en Sarrià (Valencilando)
de la 16a ĝis la 22a de julio 2007**

› pli da informoj ĉe www.esperanto.cat/spr

Kortuŝita jam revenis la kataluna teamo

“Kortuŝita jam revenis la kataluna teamo” fariĝis devizo de junaj katalunaj esperantistoj, kiam oni reiras hejmen post sukcesa esperantajo. La ripetado de tiu frazo revene de la madrida renkontiĝo estas klara montrilo pri ties sukceso.

De vendredo la 9a ĝis dimanĉo la 11a de marto 2007 okazis la Kampardoma Renkontiĝo en Madrido. La ideo kunigi esperantistojn el ĉiuj partoj de Iberio transiris la geografiajn limojn de la kuniklejo kaj, krom portugaloj, galegoj, kastilianoj, andaluzoj kaj katalunoj, partoprenis la eventon i.a. rusino, italo, okcitano, franco, germanino kaj britoj. Dank' al la impeto de la madridaj junaj HEJS-anoj kaj al sindonema helpo de SAT, pli ol 70 homoj partoprenis la esperantalon, inter kiuj 18 gekatalunoj helpis etosigi la aranĝon.

Krom ĝisostaj movadanoj, konsiderinda kvanto da novuloj spertis sian unuan esperantalon kaj granda kvanto da scivolemuloj kaj novlernantoj aliĝis al la evento, precipe ĉar la ĉefa programero temis pri kurso de la internacia lingvo. Krom tiu kurso, okazis kelkaj interesaj prelegoj pri verkado kaj legado en esperanto, pri historio de esperanto dum la hispana milito, pri ajdoso, pri ornitologio; kaj la vesperoj estis riĉigitaj per filmoj kaj noktumadoj tra Madrido. Dimanĉe matene interese gvidata ekskurso tra la ĉefurbo fermis la aranĝon.

El gazetara vidpunkto, la renkontiĝo ne montriĝis sukcesa, tamen, gravaj kaj mala-grablaj politikaj okazajoj samtempe okazintaj en Madrido, kaj malgaja tria datreveno de la kruelaj bombatakoj en madridaj trajnoj malhelpis la diskonigon de la aranĝo en la amaskomunikiloj. Aliflanke, vendredon manteue, antaŭ la komenciĝo de la renkontiĝo, prelego pri esperanto okazis en la universitato de la apuda urbo Leganés, kadre de ties solidaraj tagoj.

Tiu renkontiĝo temas pri la tria siaspeca. Iberiaj renkontiĝoj komenciĝis antaŭ du jaroj en Mataró kaj ĉiujare sinsekve ili okazas en Katalunio, Portugalio (Areia Branca) kaj Hispanio (Madrido), do en la sekva jaro estas denove nia vico. Espereble baldaŭ an-daluzoj, eŭskoj, galegoj kaj aliaj popoloj de



Partoprenantoj en la Ibera Renkontiĝo en Madrido

la kuniklejo aliĝos al la projekto. Reve, ĝi estonte eĉ transiru la Pireneojn. En la pr-tempo, estis iberoj ankaŭ en granda parto de Okcitanio.

Gratulon, madridanoj! Venontjare en Kata-lunio ni klopodos vin feliĉigi reciproke.

Ferriol Macip i Bonet

Vakigo en Premià de Mar

La sindikato CNT en Premià de Mar estis senigita de la ĉambro, kiun ĝi disponis por si, en kulturdomo de la magistrato de Premià. Tio ne nur blokis la sindikatan laboron, sed ankaŭ ties kulturajn aranĝojn, i.a. la okazigon de esperanto-kursoj, pro kio KEA skribis protestis al la magistrato kaj invitis aliajn esperanto-asociojn same fari, memorigante, ke la kunlaboro de KEA kaj CNT en Premià de Mar estis pozitiva ankaŭ por la urba vivo, ĉar ĝi permesis i.a. la okazigon de sinsekvo de prelegoj en la pasinta jaro. La premado montriĝis fruktodona, ĉar la urba konsilantaro montris sian pretecon malfari la decidon, sed la subita morto de la urbestro en trafik-akcidento kaj la sekva reorganizo de la magistrato malfruiĝas la solvon de la problema.

**La kunlaboro de KEA
kaj CNT en Premià
de Mar estis pozitiva
ankaŭ por la urba vivo**

Por engaĝita sociolingvistiko

Artikolo de Hektor Alos aperis en la libro *Tutmondiĝado – lingvoj de malgranda disvasteco – interlingvistiko: situacioj kaj*

problemoj, redaktita de prof. Aleksandr Melnikov kaj ĵus eldonita de la Instituto pri Eksterlandaj Lingvoj de Rostov-na-Donu (Rusio). La verko kunigas prelegojn prezentitajn en la konferenco pri “funkciado de minoritataj lingvoj en cirkonstancoj de tutmondiĝo” okazinta en oktobro 2004 en Ŝupaĉaro (Ĉuvašio). Ĝi ampleksas artikolojn pri Ĉuvašio, Gagauzio kaj Nord-Osetio apud pli ĝeneralaj, kiel la kontribuo pri Vikipedio kiel rimedo por konservi kaj disvasti minoritatajn lingvojn aŭ pri la rolo de esperanto en interkultura dialogo. En sia artikolo “Por pli engaĝita socilingvistiko” Alos pledas por socilingvistiko kiel rimedo por solvi sociajn problemojn. La libro eldoniĝis en du volumoj: la unua havas la prelegojn en la rusa kun ĉuvaša resumo, dum la dua entenas la plenajn tekstojn en esperanto kaj bibliografion. Ĝi estas eldonita en 2000 ekzempleroj kaj vaste dissendita tra la universitataj bibliotekoj de la Rusia Federacio.

Melnikov, Aleksandr (red.). *Глобализация – языки малого распространения – интерлингвистика: ситуации и проблемы. Tutmondiĝado – lingvoj de malgrandaj disvasteco – interlingvistiko: situacioj kaj problemoj. Глобализаци*

– саура уса куракан чөлхесем – интерлингвистистика: төрлөү симуациләхпә мамка паман ыйтусем. Rostov-na-Donu: Izdatel’-stvo rostovskogo instituta inostrannyh jazykov, 2006. 156 + 116 p. ISBN 5-85216-055-5 kaj 5-85216-056-3.

Renaskiĝas La Bulteno

En decembro, Karles Berga relancis *La bulteno*, la monatan retan informilon de Barcelona Esperanto-Kontaktejo, kiu naskiĝis en 2003 kaj aperis dum iom pli unu jaro. La nova eldono, celanta esperanto-simpatiantojn, flankenlasas la uzon de esperanto kaj estas plene en la kataluna. Ĝi ne plu estas nur retposta disvastiĝita, sed havas blog-formaton kaj legeblas en la retpaĝo labulteno.blogspot.com.

Intervjuo al Manel Vinyals

Manel Vinyals estis intervjuita de Pola Radio en la elsendo de la 17a de februaro pri sia libro *Kun esperanto en la tornistro*. Precize unu monaton poste, la 17an de marto, denove Pola Radio raportis pri kataluna esperanto-agado, nome pri

la projekto de aŭtomata tradukilo el la kataluna kaj la hispana esperant.

Telefona partopreno

Carlos Hernández, post sia pasint-oktobra partopreno en la Lingva Festivalo de Ŝupaĉaro (Ĉuvašio), estis surprize vokita por telefono partopreni en nova lingva “festiveleto” en Tihvin (Rusio). Dek jarojn post la okazigo de la unua lingva festivalo en Ĉuvašio, en la lastaj monatoj la iniciato sukcese disvastiĝis al aliaj urboj de la Rusia Federacio: Peterburgo, Moskvo kaj Tihvin.

Muzikaj partoprenoj

La Tut-Pirenea Esperanto-Koruso, gvidita de Carles Vela, partoprenos la kongreson de SAT-Amikaro en Artiga (Gaskonio), okazonta de la 7a ĝis la 10a de aprilo. Carles Vela gvidis la du lastajn pireneajn korus-staĝojn en Lengadoko, en novembro 2005 kaj oktobro 2006. Siaflanke, la ensemblo Kaj Tiel Plu gastos en la kongreso de la regiono de Rodano-Alpoj, okazonta en Bôrg (Arpitania) de la 25a ĝis la 27a de majo.

Omaĝo al Renat Llech-Walter

Renat Llech-Walter forpasis. Li mortis preskaŭ 101-jara, post plene okupita vivo. Lia memoro indas je nia dankemo. Ekde 1921 (li tiam estis 15-jara), li lanĉis sin en la rusiljonan vivon kaj influis ĝin en multaj fakoj. Atestas tion la multnombraj omaĝoj. Ekde tiam, ĝis sia morto, senĉese li estis fidela zeloto de la zamenhofa lingvo, sciante

Josep Ferrer i Manyà (1931-2007) forpasis la 26an de januaro en Barcelono, kie li loĝis. Bonkora kaj diligenta samideano, li persiste laboris por la disvastiĝo de esperanto, ĉefe pri instruado. Ni tutkore kondolencas edzinon Carme Clot kaj gefiliojn kun la garantio, ke nia movado ŝuldas al la memoro de Josep eternan dankon.

apliki la komplementecon de la regiona, nacia kaj internacia sentemoj. Okdek kvin jaroj da aktiveco estas nekutima fakteto. Tiu vivado legeblas, ĝis 1985, en la libro *Histoire du mouvement espérantiste en Roussillon*, eldonita de la revuo *Conflet*. Renat Llech-Walter daŭrigis la agadon de la rektoro de la akademio de Dijono, Émile Boirac, mortinta en Salses en 1917; de Paul Berthelot, ĉe la presisto Lamiot en Ceret; d'Émile Bell-sola, proto ĉe *L'Indépendant*, kaj multaj aliaj. Dum februaro kaj marto 1935, kun sia sindonema kunlaboranto Robert Gendre, li akceptis Lidjan Zamenhof, la filinon de la iniciatinto de la lingvo Esperanto, kiu venis ĝin instrui per la rekta metodo. Tiel, la jaron 1936, la municipo de Perpinjano decidis doni la nomon de Zamenhof al ĵus kreita nova strato ĉe la malnova milithospitalo. La alirejo al tiu

vojo situis precize fronte al la oficejo de Renat Llech-Walter. Dum la dua mondmilito, la tiama faŝista municipo ŝanĝis ĝian nomon pro la judeco de Zamenhof. Sed je la Liberigo de Francio, la nova urbestraro redonis al ĝi la originan nomon, laŭ peto de Renat Llech-Walter kaj Robert Gendre. En 1943, Renat Llech-Walter kreis interhelpan komitaton por la militaj malliberuloj kaj la esperantistaj viktimoj. La maljuneco kaj la blindeco malebligis al li koni la sukceson de esperanto sur la reto, tutmonde. Sed ĉiuj fojon li aŭdis parolis per aŭ pri esperanto, li respondis pasie. En ĉiuj siaj projektoj, Renat Llech-Walter neniam dubis kaj ĉiam agis entuziasme kaj persisteme.

Jean Amouroux
el *L'Indépendant* (1an de februaro 2007)
Trad. Esperanto-Conflent

“L’Afer Tornasol” en francoprovençal

Nicole Margot (de Etnismo)
Traducció: Robert Navarro

S'anuncia per al març de 2007 la segona obra d'Hergé en francoprovençal, L'Afére Pecârd. La primera, Lé Pèguelyon de la Castafiore, que aparegué al començament d'aquest any, ha estat traduïda al dialecte de la regió oriental francesa de Bresse.

L'Afére Pecârd, tanmateix, és una primícia pel fet que és la primera obra literària que apareix en l'ortografia interdialectal proposada per Dominique Stich, que també ha traduït les aventures de Tintín a diversos dialectes francoprovençals. En aquest treball de traducció han col·laborat també parlants dels corresponents dialectes. Per fer més entenedor aquest esdeveniment als lectors d'Etnismo, hem entrevistat el traductor, així com també el jove president de l'associació Arpitània, Alban Laby, que s'ha encarregat de la publicació de l'àlbum.

Dominique, abans de parlar de la teva traducció, ens podries dir per què et vas interessar tan vivament per la llengua francoprovençal fins al punt de dedicar-hi la teva tesi doctoral?

Tot va començar amb el desig de comprendre aquesta llengua, que –d'altra banda, igual que d'altres– existeix només en moltes varietats, però sense que, fins ara, cap publicació tractés del seu cos total. De més a més, em vaig anar adonant cada cop més de la presència habitual d'affirmacions equivocades sobre aquesta: no es tracta pas d'una llengua gairebé moribunda, ja que en queden encara molts parlants, fins i tot de naixement; i especialment és erroni afirmar que la seva literatura és molt escassa, ja que, contràriament, és extremadament rica, molt més la de moltes llengües reconegudes a França, a Suïssa o en altres indrets, sols que, per ser poc publicada i poc difosa, és poc coneguda. Finalment, la volia donar a conèixer al major nombre de persones possible, inclos el ministre d'educació francès. Tot això justifica tota una tesi.

Quins obstacles vas trobar?

En primer lloc, vaig escollir una ortografia inspirada en l'occitana, que aleshores jo aprenia. Però, encara que el punt de par-

tida era bo (l'occità també coneix moltes variants de pronunciació), les convencions gràfiques de l'occità no s'adaptaven del tot al francoprovençal, sobretot a causa del sistema vocàlic. Calia repensar tot el sistema, i especialment recollir les nombroses formes de tot el territori francoprovençal, a través de tres canals: els diccionaris locals, els textos literaris i, finalment, els atles lingüístics. La creació d'aquesta ortografia va ser lenta, d'uns deu anys de progrés, amb continus ajustaments, per a uns deu mil mots d'un corpus de 200.000 a 300.000 formes recollides –incloent-hi topònims i formes gramaticals, com per exemple de conjugació. Les dificultats naixien, doncs, de la quantitat de mots, de l'aproximació mútua de formes diverses sovint no reconeixedores, de les solucions que calia adoptar, de vegades decidides per a cada cas... Un paixà en què sovint



Àrea lingüística del francoprovençal





Dominique Stich, creador de l'ortografia unificada del francoprovençal, i Alain Favre, membre del Comitè Internacionals per les Llibertats Ètniques, editor de la revista Etnismo

Calia que l'ortografia fos “llatina”, galloromana i tal que representés totes les variants dialectals de la llengua

calia no caure era la temptació fonètica per a problemes de resolució ortogràfica; és a dir, voler posar-hi més “pronunciació” per a un mot, amb perjudici de la seva inclusió en un sistema, que per essència ha de ser etimològic, i per tant preferiblement abstracte. Ca-

lia que l'ortografia fos “llatina” (evitant, per exemple, les lletres *k* i *w*), gal·loromana, ni massa simplificada ni massa complexa, i tal que representés totes les variants dialectals de la llengua.

Tu ets el primer, si no m'equivoco, que s'ha interessat per l'ortografia comuna del francoprovençal, i que, com acabes de dir, has escollit una ortografia etimològica propera a la de les dues altres llengües galloromàniques, la francesa i l'occitana. Aquesta ortografia ha despertat molt d'interès, però també una forta oposició. Com t'ho expliques? Com ho experimentes?

Joseph Henriet (de la Vall d'Aosta) ja va intentar proposar una ortografia d'aquest tipus fa uns deu anys, però aleshores no li van fer gaire cas. El problema és que la llengua francoprovençal va ser descoberta tard –i durant molt de temps rebutjada–, molt impròpiament anomenada –ja que aquest

Tal com s'ha dit sovint, el terme francoprovençal induceix a error i fa creure que la llengua és una mescla del dialecte occità, el provençal, i el francès. Per això molts, com Alban Levy, prefereixen el mot arpità (de Arp ‘Alp’). Alban Levy és savoià, de la riba del llac Leman, però va estudiar i treballar i a més viu a la Suïssa de cultura francesa. Fa uns quants anys va fundar amb uns amics la associació Arpitània, que ha endegat la publicació de L’Afére Pecârd.

Alban, ens pots dir què és Arpitània?

Els dialectes arpitans, escampats per petites regions, estan amenaçats de desaparèixer tard o d'hora. La unificació de forces en tots els medis dialectals de la regió arpitana ha de moure la consciència dels seus habitants. És cert que són molts els dialectes, però tots ells es basen en la mateixa llengua. A França i a Suïssa l'arpità no és reconegut com a llengua minoritària. Per exemple, els dialectes savoians s'atribueixen de vegades a la llengua d'oïl i de vegades a l'occità. Desitjant treballar fora dels medis dialectals, a causa de la gran diàisia dels quals fa quaranta anys que lluitem pel reconeixement de l'arpità, hem creat una petita estructura per a fer progressar l'arpità i per a donar a conèixer la seva àrea lingüística, l'Arpitània.

Presentar un àlbum de Tintín en arpità, mentre la llengua resta

fragmentada en dialectes, no és tasca fàcil. Què us motiva a tu i l'associació Arpitània?

Traduir un àlbum de les aventures de Tintín, tresor mundial i testimoni de la història del segle XX, fa possible donar a conèixer l'arpità al públic. I amb més motiu, ja que *L'Affaire Tournesol* té lloc a Arpitània i que es tracta d'una de les millors obres de Hergé. De més a més, l'autor encoratja a fer traduccions a diverses llengües, fins i tot minoritàries.

Pots dir unes paraules sobre les dificultats que has trobat en preparar aquesta presentació?

La primera dificultat consisteix en el fet que nosaltres no som prou gent per a preparar aquesta presentació: hem de treballar al tres-cents per cent per a aquesta tasca! Però tots estem a la vaga compromesos amb altres activi-

tats a més d'Arpitània. La segona, en el fet que som totalment independents financerament. Aquesta responsabilitat finançera té el seu costat positiu: som completament *a l'abada* (lliures). No necessitem presentar comptes a ningú, i els nostres projectes avancen sense danyoses cavil·lacions.

Parla'n's de les teves esperances amb relació a aquesta presentació.

Amb aquest Tintín fem realitat la primera aparició d'un text en llengua arpitana amb ortografia unificada, i desitgem que aquesta ortografia s'accepti en el món arpità. Això no impedeix que també hi hagi traduccions en grafia fonètica o local. Tot això sembla mostrar que la llengua dels meus avantpassats de Chablais els vol sobreviure al seu país, igual que en tota la nostra euroregió. □

